


49-a

HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

19^a 23^a JULIO 1989

Kongreslibro

1989




BiLBAO



GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

1906 - 1989



No ahorramos
esfuerzos
para Nuestra Cultura.

Nuestra cultura, la cultura de Vizcaya y del País Vasco, ocupa un lugar importante entre las actividades de la Caja de Ahorros Vizcaína.

Apoyamos todas las manifestaciones culturales, como certámenes literarios, concursos de música coral vasca, ciclos de conciertos, actividades de pintura y dibujo infantil, exposiciones, becas de investigación, apoyo al euskera...

Para nuestra cultura, no ahorramos ningún esfuerzo. Porque tiene todo nuestro interés.

GURE KULTURAREN ALDEKO AHALEGINIK EZ DOGU UKATZEN. Gure kulturak, Bizkaiko eta Euskal Herriko Kulturak, toki berezi bat dauka Bizkaiko Aurrezki Kutxaren ekintzen barruan.

Era guztietako kultur ekintzak bultzatzen ditugu: literatur sariketak, abesbatz musika lehiaketak, kontzertualdiak, umeentzako margo eta marrazki lehiaketak, erakusketak, ikerketa bekak, euskera eta abar.

Gure kulturaren aldeko ahaleginik ez dogu ukatzen. Behin-behinekoa dalako. Geure. Geurea.

**BIZKAIKO
AURREZKI KUTXA**



**CAJA DE AHORROS
VIZCAINA**

49-a
HISPANA KONGRESO
DE ESPERANTO



19/23 Julio 1989

BILBAO

HONORA KONGRESA KOMITATO

Sro. José Antonio Ardanza Garro,

Prezidanto (*Lehendakari*) de la Vaska Registaro.

Sro. Ramón Jauregui Atondo,

Vic-Prezidanto (*Vicelehendakari*) de la Vaska Registaro.

Sro. José María Gorordo,

Urbestro de Bilbao.

Sro. José Alberto Pradera Jauregui,

Prezidanto de la Vizkaja Deputacio.

Sro. Fernando Buesa,

Prezidanto de la Alava Deputacio.

Sro. José Angel Cuerda Montoya,

Urbestro de Vitoria-Gasteiz.

Sro. Gerardo Pradas Calvo,

Urbestro de Portugalete.

Sro. Emilio Barberá Guillem,

Rektoro de la Vaska Universitato.

Sro. Javier Corcuera Atienza,

Dekano de la Fakultato pri Ekonomika Scienco.

SALUTO DE LA URBESTRO

Kvarafoje, post 1924, 1953 kaj 1966, Bilbao pretiĝas por akcepti novan kongreson, de la Esperanto-Federacio.

La frua okazigo de la unua el tiuj kongresoj, kiuj estis la kvara de la ĝis tiam aranĝitaj, permesas kompreni la ege rapidan enradikiĝon, ĉe ni, de tiu idealo pri la ebleco ke ĉiuj homoj interkompreniĝu.

Kvankam oni devis atendi ĝis 1924 por okazigi kongreson, de antaŭlonge, vaskaj esperantistoj montris febran aktivecon, kiu kondukis al la fondo, la 20-an de Mayo 1906-a, de la Grupo Esperantista de Bilbao, unu el la plej malnovaj en la Mondo kaj kerno de la posta apero de aliaj grupoj en diversaj urboj kaj vilaĝoj de Vaskio: Baracaldo, La Arboleda, Ordizia, Donostia, Rentería, k.t.p.



Bilbao, urbo malfermita al la Mondo pere de ĝia haveno, iĝis, tiel, grava kaj pionira centro por la disvastigo de la mesaĝo pri universaleco, kiun Esperanto reprezentas. Sed, samtempe, kiel fakta ĉefurbo de Vaskio, sin rigardante internen, ankaŭ kaptis la gravecon de Esperanto kiel helpilo por la postvivado de minoritataj etnaj lingvoj kiuj, samkiel nia "Euskera", trapasas aŭ trapasis malfacilajn momentojn.

La devizo «Ĉiu popolo havu sian propran lingvon kaj Esperanto estu ĉies uzata – *Herri bakoitza bere hizkuntzan eta Esperantoa denontzat*», estis korintime sentita de la Bilbao-aj Esperantistoj, kiuj jam en 1935, eldonigis tiun malgrandan juvelon, ankoraŭ gardata en la Grupo de Bilbao, kiu estas la "Esperanto Giltza" ("Ŝlosilo de Esperanto"), la unua gramatiko en vaska lingvo pri Esperanto, kiu ankaŭ enhavas la unuan vortaron Esperanta - Vasca.

ONGI ETORRIAK BILBORA - BIENVENIDOS A BILBAO
BONVENITAJ EN BILBAON

José María Gorordo,
Alcalde de Bilbao

ESTRARO DE HISPANA ESPERANTO – FEDERACIO (H.E.F.)

Sidejo: Carreras Candi, 34-36. 08028-BARCELONA. Tel. (93) 240.26.62

PREZIDANTO: Salvador Aragay i Galbany

VICPREZIDANTO: Luis María Hernández Izal.

SEKRETARIO: Víctor Ruiz Rodríguez.

VICSEKRETARIO: Josep Miranda Calvo.

KASISTO: Joan Font Civit.

ESTRARANOJ: M^a Rafaela Urueña Alvarez.

Víctor Ortiz Gratal.

Francisco Zaragoza Ruiz.

Adonis González Meana.

Tomás Caspe Cereijo.

JUNULARA SEKCIO (H.E.J.S.):

Poŝtadreso: Poŝtkesto 23.484. 08080 – BARCELONA

Prezidanto: Jordi Ferré.

Komisiito: Iñaki Gauna (Komitatano de HEJS en TEJO).

ĈEFREDAKTORO DE “BOLETIN”: Giordano Moya Escayola.

Balmes, 38. 08225 – TERRASSA (Barcelona).

LIBRO – SERVO: Luis Hernández García.

Poŝtkesto 119. 47080 – VALLADOLID.

ELDONA FAKO: Inés Gastón.

FINANCOJ: Agustín Foix.

FERVOJISTA SEKCIO: Rafael Ruiz Criado.

ĈEFDELEGITO DE U.E.A.: Juan Azcuénaga Vierna.

Gral. Dávila, 127 - portal 7 - 2^o I. 39007 – SANTANDER.

UEA-KOMITATANOJ: Salvador Aragay i Galbany.

Luis Hernández García.

OFICEJO: J. M^a González Aboín.

Rodríguez San Pedro, 13 - 3^o. 28015 – MADRID.

SALUTO DE LA PREZIDANTO DE H.E.F.

Estimataj gekongresanoj. Kiam vi legas ĉi-liniojn, la 49-a Kongreso estas preta malfermi sian pordon, kaj vi travivos novajn emociojn kaj novajn spertojn danke al la diversaj eroj el la Programo, ĉiu el ili ellaborita de tre entuziasma kaj kompetenta Loka Kongresa Komitato.



Nia Kongreso estas la unika okazaĵo en la Hispana Esperanto-Movado por serioze pristudi je pli alta nivelo, la nunan situacion de la internaciaj lingvaj rilatoj de la ŝtatoj, landoj kaj internaciaj organizaĵoj; tial la HEF-estraro rekomendas kaj sugestas, ke vi profitu ĉi-eventon por ampleksi viajn konojn.

Plie, la nuna HEF-estraro finas sian laborperiodon en ĉi-Kongreso, kio devigas la elekton de nova HEF-estraro, longan studadon pri la estonta agado kaj interparoladon inter ĉiuj delegitoj de la Esperanto-organizaĵoj aliĝintaj al HEF, cele al despli bona funkciado de HEF kaj ĝiaj sekcioj kaj fakoj. Bonvolu ĉeesti la debatojn, partoprenu en la laborgrupoj, ekspliku viajn ideojn, interkonsentu kun la aliaj delegitoj. Nur kun via kunlaborado la Kongreso sukcesos.

Kaj nun, lastaj vortoj por danki, kara kongresano, viajn diligentecon, sistemon kaj laboremon, ĉeestante regule la Kongresojn, ĉar sen vi, nia ĉiujara renkontiĝo ne sukcesus, sen vi, la Programo ellaborita de la Loka Kongresa Komitato, ne povus realiĝi, kaj finfine, sen vi, neniu ero el la Kongreso povus sukcesi. Denove, dankon.

Salvador Aragay i Galbany,
Prezidanto de H.E.F.

LOKA KONGRESA KOMITATO

Prezidanto : José Luis Bringas Tellechea.

Vicprezidanto: Julio J. Juanes Sáinz.

Sekretario: Iñaki Vélez Ortiz.

Kasisto: Jesús Miguel García Iturrioz.

Komitatano pri publikaj rilatoj: Eduardo Larrouy López.

Komitatano pri komunikaj medioj: Enriqueta Sesmero Cutanda.

Komitatano pri kongresejoj: Tomás Apraiz Riberas.

Komitatano pri ekskursoj kaj bankedo: Teodoro Ibáñez Martín.

Komitatano pri loĝado: Frieda Van Houten.

Komitatano pri artaj programoj kaj konferencoj: Julio J. Juanes Sáinz.

Komitatano pri junularaj programoj: Santiago Martín Relea.

Komitatano pri ekspozicio kaj libro-servo: Iñaki Vélez / Jesús M. García.

Komitatano pri informoficejo: Igone Manciles Marín.

Komitatano pri filatelaĵoj: Juan Liceranzu Ortega.

ESTRARO DE LA GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

PREZIDANTO: Jesús Miguel García Iturrioz


VICPREZIDANTO: Tomás Apraiz Riberas.

SEKRETARIO: Iñaki Vélez Ortiz.

KASISTO: Teodoro Ibáñez Martín.

VOĈDONANTINOJ: Frieda van Houten


Enriqueta Sesmero Cutanda.



SALUTO DE LA PREZIDANTO DE LA L.K.K.

Karaj geamikoj:

Jen alia Nacia Kongreso. Ni havos la okazon renkonti fidelan korespondanton, revidi ŝatatajn vizaĝojn de ĉiamaj konatuloj, resume, vivi en samideana kaj amikeca rondo dum kelkaj tagoj.



Ardaj kongresaj debatoj en la organizataj kunvenoj, firmaj proponoj kaj konkludoj, seriozaj planoj, oficialaj aktoj. Ĉio-ĉi, denove, unu jaron plian. Sed, en la vivo, kvankam ĝi estu Esperanta, ne nur la protokolaĵoj havas ĝustan lokon, ankaŭ la distraj aranĝoj, ekskursoj kaj samparencaj plezuroj enviciĝas en la ĉi-jara programo.

Tamen, Esperanto ĉiam la ĉefa protagonisto, Esperanto kiel centro de niaj klopodoj, kiel fina punkto de nia alirado.

Nia movado havas gigantajn bezonojn; nia revo, la triumfo de Esperanto, nur estos la frukto de planita agado, formalaj programoj kaj, speciale, de senlaca kaj persona sindediĉo.

Estu Bilbao la nesto kie povos naskiĝi la trafaj decidoj, la kompromisoj, kiuj antaŭenpuŝos nian movadon en la necesan vojon.

Bilbao, gastema urbo, ofertas la plej agrablan etoson por fruktodona kaj plena disvolviĝo de niaj taskoj, kaj mi esperas ke la demarŝoj kaj klopodoj de tiu-ĉi Loka Kongresa Komitato havos ĝuindan premion je la fino de la Kongreso, pro ĝisfunda atingo de niaj objektivoj.

José Luis Bringas Tellechea
Prezidanto de la L.K.K.

LA KOMENCO

Laŭ rakontas niaj plej maljunaj Esperantistoj, ĉirkaŭ la jaro 1904-a, loĝis en Algorta (urbeto 13 km. norde de Bilbao) tiu, kiu laŭŝajne estis la unua Esperantisto de Vizkajo, nome, Rufino de Unzaga. Tiun-ĉi saman jaron, malgrava evento, tiel kiel publikigo de artikolo pri Esperanto en loka ĵurnalo, estis la «malgranda kandelo de kiu forbrulas granda kastelo».

Efektive, sekve de tio, diversaj grupoj de homoj kortuŝitaj de la “interna ideo”, kunsidis kun la celo lerni E-on. Unu el tiuj grupoj formis kelkaj socioj de la ege fama, elita kaj aristokrata, “Bilbao-a Societo”; inter la elstaruloj kiuj tiamaniere alvenis al Esperantujo, indas menciigi jenajn: Victor Olegario de Allende, ĉefinĝeniero pri transportvojoj de la Vizkaja Deputacio; Juan Zabala, administranto de la “Patrineca Domo”; José Echevarría, kies frato Federico estis la fondinto de la grava entrepreno “*Echevarría, S.A.*”; Gregorio Prados Urquijo, klera advokato; José Velasco Ealo, komisiito de la komerc-kompanio “*A. Konrad & Co*”.

Personoj apartenantaj al pli modestaj soci-tavoloj, preskaŭ ĉiuj kontoristoj, formis alian grupon, kies sidejo estis la privata loĝejo de Teodosio Mendive. Krom li, ankaŭ apartenis al tiu grupo lia frato Leonardo, Fernando Alonso (mekanisto, elpensinto kaj fama tenoro), Roberto Alonso (stiristo kaj frato de la antaŭa), Isaac Lorente (komisiito de “*Talleres Deusto, S.A.*”), José Aguirreche kaj José Santamaría Neira (bank-kontoristoj).

Alia grupo aperis en la “Studenta Asocio”. De tiu-ĉi, nur restas memoraĵo pri Sro. Guezala, kiu poste fariĝis industria inĝeniero.

Sendepende de la antaŭaj grupoj, speciale menciinda estas Teodoro Elizondo Calera, elstara Esperantisto kaj aŭtoro de “TUTO”, la unua kaj unika vortaro Esperanta - Vaska, poste titolita “*Esperanto giltza*” (*gilĉa*), tio estas, “Ŝlosilo de Esperanto”. Li estis vera aŭtodidakto, kiu sen alies helpo, kaj en tre mallonga tempo, plenregis la Internacian Lingvon.

Tia estis la situacio en 1905, kiam la membroj de la tri grupoj, kune kun Sro. Elizondo kaj aliaj izolitaj simpatiantoj, decidis fondi pli gravan asocion. Por tion efektiviĝi, estis alvoko, pere de la lokaj ĵurnaloj, al ĉiuj homoj interesitaj pri la ideo. La alvoko plene sukcesis kaj, ekde tiam, ĉiam kun la sama nomo, ekzistas la “GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO”, fondita la 20-an de Majo 1906-a, al kies unua estraro apartenis: Teodoro Elizondo (*Prezidanto*); Victor O. de Allende (*Vicprezidanto*); Rufino de Unzaga (*Sekretario*); Manuel Zabala (*Kasisto*); José Santamaría, Isaac Lorente kaj José Aguirreche (*Voĉdonantoj*).

Honoraj Prezidantoj estis nomumitaj Dro. L.L. Zamenhof, de Varsovio, kaj Sro. Ricardo Codorniu, de Murcio, «kiel atesto de estimo kaj konsidero».

LA ĜISNUNA FINO

Se oni parolas pri la plej elstaraj trajtoj de la agado de la GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO dum la lastaj jaroj kaj por iom sistemigi la raporton oni decidus fiksi precizajn datojn, tio estas, tiuj tagoj aŭ jaroj el kiuj devenas la nuna stat-punkto, nia cerbo certe iras tuj serĉi, inter siaj memor-kurbaĵoj, du jarojn: 1980 kaj 1981.

Efektive, en Julio 1980-a, 14 tre junaj membroj de nia Asocio kuraĝis preni siajn tornistrojn kaj preskaŭ malplenajn monuojn, por unuafoje en sia vivo konstati ke E-o estas iom pli ol teoria lingvo lernita inter la 4 muroj de la maljuna kaj kaduka Grupo Esperantista. La ĝojo kiun ili sentis, alvenintaj en la Krakov-an trajn-stacidomon, je la 3-a frumatene, kiam blonda, maldika kaj simpatiega pola samideano ilin alparolis Esperante, estas ne priskribebla. Tiu unua vojaĝo al Krakovo (Pollando), signalis la komencon de pluraj vojaĝoj kiuj rapide sinsekvis jaron post jaro: la dua, partoprenita de 12 gejunuloj, estis al Bjalistoko (naskiĝurbo de Zamenhof); poste, Hungario, Bulgario, Jugoslavio, Svedio, Finnlando, Italio,.... Hodiaŭ, niaj plej junaj membroj havas amason da amikoj (veraj, ne laŭnomaj, amikoj) tra la tuta Eŭropo kaj la nomo "Bilbao" aŭdiĝis en multaj E-societoj.

Alia grava jaro estis 1981, kiam ni festis la 75-an datrevenon de la fondiĝo de la Grupo. Krom la pliiĝo de aktiveco, kiun postulas ian similan organizon, kio siavice kunportas konstatablan plivigligon de la asocia etoso, estas alia pli subtila kaj malpli videbla franĝo, kies postsekvoj tamen estas pli gravaj estontece. Ni parolas pri la malfermo al oficialaj Institutioj, io ne sufiĉe atentita, ĝis tiam, de ni. Niaj demarŝoj multflanken ebligis alparolon kaj eĉ ekamikigiĝon al gravuloj de la politika, kultura, ekonomia kaj socia medioj de Vizkajo. Tiun malfermiĝon sekvis kontaktoj diversaj, kies plej tuŝeblaj fruktoj estis la diversaj subvencioj atingitaj, kiuj malgraŭ ĝia malgrandeco kaj malabundo, grave kontribuis al nia subteno, precipe dum la lastaj malfacilaj jaroj, kiam renovigo de nia maljuna kaj preskaŭ ekrenversonta sidejo iĝis neprokrastebla.

Kaj fine, dank' al organizo de tiu-ĉi 49-a Hispana Kongreso, kontaktoj kun Institutioj plifirmiĝis: ni atingis Esperantigon de la vidbendo "Vivi en Eŭskadi", far de la Vaska Registaro; en la Urbodomo, en diversaj fakdepartamentoj de la Vizkaja Deputacio kaj de la Vaska Registaro, en Muzeoj, en ĵurnaloj, k.t.p., krom la konkretaj helpaĵoj, lace kaj laboreme atingitaj, niaj voĉoj aŭdiĝis kaj ni havis la okazon klarigi kaj niajn celojn kaj niajn problemojn, kaj eĉ niajn revojn.


Ĉio-ĉi kreis bazon sur kiu apogi niajn estontajn laborojn, nun kiam H.E.F. havas difinitan agadplanon por la venontaj jaroj, kaj ebligas ke ni pli optimisme rigardu nian proksiman estontecon, voje al centjariĝo de la Grupo Esperantista de Bilbao.



AL LA GEJUNULOJ

Alia jaro, alia Kongreso, malnovaj amikoj kaj... Denove ni povas kunveni okaze de la Hispana Esperanto-Kongreso por retrovi malnovajn amikojn, koni novajn amikojn, gaji, amuziĝi kaj labori por nia movado.

Post tiu enkonduko, mi alvokas la gejunulojn (estonteco de nia agado) por ke ili aktive partoprenu en la HEF-kunvenoj kaj HEJS-aranĝoj, en kiuj, tiun-ĉi jaron, oni devos preni gravajn decidojn en rilato al nia Federacio, junulara sekcio kaj ilia estonteco.



Dum la lasta Kongreso ĉe Valencio, multe da gejunuloj partoprenis (inkluzive, la aŭtoritatuloj surpriziĝis pri tio) kaj mi esperas ke tiun-ĉi jaron ankaŭ okazos same, kaj ke kune kun la olduloj, oni povos plialtigi nian Esperantonivelon, niajn esperojn kaj niajn atingojn.

Do, fine, mi nur deziras la aktivan partoprenadon de la gejunuloj en ĉiuspecaj federaciaj aferoj.

Al niaj Bilbao-aj amikoj nur gratulojn por ĉi-Kongreso.

Antaŭdankon !

Jordi Ferré,
Prezidanto de HEJS



NIA FESTPAROLANTO

AMADOR DIAZ naskiĝis en Portugalete sed depost la deka tago de sia vivo ĝis elmigris en Brition, je Majo 1937, li loĝis en Bilbao. La patro estis fervora Esperantisto, do, li aŭdis pri Esperanto jam de la frua infanaĝo. Inter la jaroj '39 kaj '47 li aktiviĝis en hispana kaj vaska kulturaj asocioj en Londono. Laboris en diversaj metioj ĝis li gajnis stipendion por studi arkitekturon, diplomigante pri ĉi-tiu temo, kaj sekve li akiris ankaŭ diplomon pri ligna teknologio. Esperantiĝis en 1947 kaj baldaŭ aktiviĝis en la Movado. En 1956 elektiĝis al la Konsilantaro de la Brita Esperanto-Asocio kaj en 1959 al ĝia estraro. Komitatano de UEA de post 1972. Prezidanto de la Brita Asocio de post 1987. Prelegis en Esperantaj rondoĵoj en Britio, Danlando, Jugoslavio kaj pri la "Jaro de la loĝmedio" dum la 61-a UK en Ateno. Aperigas artikolojn kaj recenzojn en pluraj revuoj; regule kontribuas al "Monato". Vicprezidanto de la L.K.K. por la 74-a Kongreso en Brajtono.

ARTAJ, KULTURAJ KAJ SCIENCAJ HOROJ

Tago kaj horo: Ĵaŭdon 20-an de Julio. 10/11 h.

Loko: Kongresejo.

Preleganto: Sro. Adelino Franco Simões.

Temo: Deklamado de parto de la monumenta portugala poemo "Luziado".

Rimarkoj: Esperante. 20 min. de deklamado. Eventuala posta debato pri la historia evento.

Sro. Adelino Franco Simões, 65 jaraĝa, mekanika inĝeniero (IST-Lisbono), Esperantiĝis ekde 1970, en Lourenço Marques (nuna Maputo), en Moçambique (eksa portugala teritorio ĉe Hinda Oceano). Vicprezidanto de PEA ekde 1975. Organizinto de la 17-a Internacia Konferenco de ILEI en Sintra (Portugaliao, 14/22 Julio 1983).

La kontribuo de Sro. Simões al la Kongreso temos pri deklamado de 24 strofoj (37-a ĝis 60-a) de la 5-a kanto de la poemo "LUZIADO", de Ludoviko de Kamoens (traduko de Leopoldo H. Knoedt), pri la epizodo de ADAMASTORO, giganto loĝinta dum la jarcentoj 15^a kaj 16-a en la plej suda kabo de la afrika kontinento. La nomo de tiu kabo estis ŝanĝita de portugala reĝo Don Johano, la 2-a, de Ŝtorma Kabo al Kabo de Bona Espero, kiel ĝi nomiĝas ankoraŭ hodiaŭ.

Tago kaj horo: Ĵaŭdon 20-an de Julio. 11,30/13,30 h.

Loko: Kongresejo.

Preleganto: Sro. Luis Serrano Pérez.

Temo: Laboraj kaj ekonomiaj konfliktoj inter la homoj.

Rimarkoj: Esperante. Prelegon postsekvos 1-hora debato.

Sro. Luis Serrano Pérez, profesie masonisto, naskiĝinta en Osorno (Palencia), eklernis Esperanton la jaron 1953, pere de la koresponda kurso de HEF, gvidata de Ramón Molera Pedrals. Dum sia restado en Francio, li letere konatiĝis kun Sabadell-a esperantistino María Ferigle, por kiuj baldaŭ Esperanto fariĝis edzperanto. Ekde sia edziĝo, li loĝas tiurbe, kie li gvidis/as plurajn kursojn.

S-ano Serrano krome funkcias kiel peranto de "Heroldo de Esperanto" en Hispanio, kaj kiel Ĝenerala Delegito de "Mondpaca Esperantista Movado" (MEM), per kies Honoringo, Ĝia Sekretariato lin distingis dum la pasinta HEF-Kongreso en Valencio. Ankaŭ li estas kunredaktoro de "Boletín" de HEF, sporada kunlaboranto en loka ĵurnalo pri temoj niamovadaj kaj gvidas la korespondan kurson de "Kultura Asocio Esperantista" (KAE).

Pri la prelego, kiun li malvolvos, ĝi temas pri afero neniam antaŭe tuŝita en niaj Kongresoj. Jam la titolo montras al vi ties vojon. Politiko marĝene, li analizas la diversajn konfliktojn nuntempe ekzistantajn en nia socio. La tuta prelego moviĝas ĉirkaŭ la frazo: la homo rigardas la homon, kiel instrumenton per kiu oni povas atingi monon kaj povon. Ne restas for de la prelego, la rilatoj inter la du grandaj grupoj de nia socio: kapitalo kaj laboro; la evoluo de la homa menso; la progreso kaj ĝiaj problemoj; la libero laŭ nia koncepto. Ĉio estas modere eksponata sed kun forta konvinko pri kiu vi povas konsenti, aŭ ne. Liaj eksplikoj estas konkretaj, sen ornamaĵoj, al kiuj nur konkretaj respondoj taŭgas.



Tago kaj horo: Vendredon 21-an de Julio. 11,30/12,30 h.

Loko: Vitoria - Gasteiz.

Preleganto: Sro. Amador Dfaz. Bilbaoano. Prezidanto de Brita Esperanto-Asocio.

Temo: Gaudí.

Rimarkoj: Esperante. Ilustrita per diapozitivoj.

Antoni Gaudí i Cornet (1852-1926), kataluna arkitekto, fervora katolikulo kaj ankaŭ mistikulo. Li, kiam ankoraŭ juna, aliĝis al la naskiĝanta kataluna skolo pri arto, kiu ankaŭ havis fortajn naciajn sentojn. Allogis lin la "Nova arto", kiu komenciĝis en Francio je la fino de la 19-a jarcento, sed poste li evoluigis ĝin laŭ siaj principoj bazitaj sur la inspiro "de nia Kreanto". En Barcelono troviĝas pluraj konstruaĵoj de li; la ĉefa verko estante la ankoraŭ ne finita Pentofara Templo de la Sankta Familio.

PRELEGOJ

Tago kaj horo: Merkredon 19-an de Julio. 19-a horo.

Loko: Bilbao. Urba Biblioteko (Str. Bidebarrieta, 4).

Preleganto: S-ino. M^a R^a Urueña; Bilbao-anino; profesorino en la Universitato de Valladolid pri Internacia Juro; eksprezidentino de H.E.F.

Temo: Esperanto; Kultura lingvo por la homaro.

Rimarkoj: Hispane.

La interkomunikado inter la popoloj estis ĉiam la plej dezirata idealo. Nun, ni vivas en Mondo interdependa en kiu neniu povas resti izolita ĉar pere de la grandaj amaskomunikiloj ni povas esti rapide informitaj de ĉio kio okazas for de niaj landlimoj. Tamen, kiam ekzistas tiom da teknikaj medioj por pligrandigi la dialogon kaj la kulturon, ofte ni trovas la barilon de la lingva diverseco.

Ĉiam oni pensis pri komuna lingvo kiel komunikilo, ĉefe post la malapero de la latina lingvo kiel komuna lingvo por la disvastigo de la kulturo. Kaj tiel, kulturaj homoj, filozofoj kaj internaciistoj pensis pri diversaj eblecoj de komuna lingvo (Luis Vives, Descartes, Comenius, Kant, ktp.) bazante ilin ĉu en ciferoj, ĉu surbaze de aliaj vivantaj lingvoj. Sur tiu lasta bazo naskiĝis ESPERANTO, en 1887 kiel lingvo kreita de D-ro Zamenhof, homo idealisto kaj pacifisto, kiu vidis la homajn suferojn de siaj samlandanoj apartenantaj al diversaj etnioj kaj parolante diversajn lingvojn.

Sed kio estas Esperanto, kiel kultura lingvo?

Kulturo estas homa fenomeno kaj la lingvo estas esprimo de kulturo, sed homo povas aparteni al du kulturoj, kiel okazas en diversaj regionoj, kiuj parolas la propran lingvon kaj samtempe la nacian lingvon. Ankaŭ Zamenhof konis tiun faktan, ĉar li men naskiĝis kaj vivis en plurnacia etoso.

Sed kelkaj opinias ke Esperanto estas “artefarita lingvo”. Esperanto ne estas tiel, sed pontolingvo kun internaciaj radikoj. Konsekvence, la Esperantistoj estas kapablaj komuniĝi persone okaze de internaciaj kongresoj kaj kunvenoj, per radioelsendoj, per teatraĵoj, verkoj kaj, ĉefe, en la turisma kampo.

Aliaj opinias ke la kulturo estas nur frukto de nacia heredaĵo. Hodiaŭ pli ol neniam ni scias ke ne estas tiel, ĉar la muziko, la arto, la literaturo estas vere internaciaj.

Ankaŭ aliaj opinias ke la kulturo baziĝas en la tradicio, sed ni scias ke la novaj generacioj reakcias kontraŭ la malnovaj valoroj kaj ankaŭ la progreso en la sciencoj originis gravan lingvan materialon de internacia karaktero.

Do, la lingvoj, kiel vivaj instrumentoj, transformiĝas kaj eĉ povas malaperi, kiel ni kons-tatas historie kaj nuntempe. Aliaj minoritataj lingvoj riskas ankaŭ perdiĝi. Pro tio Esperanto, pere de la internacia verkaro, ĉu tradukita ĉu originale verkita helpas al la internacia kulturo kaj samtempe gardas minoritatajn kulturojn tradukitaj al Esperanto.

Pere de vivanta, neŭtrala, internacia kulturo, komuniĝas kaj respektiĝas reciproke homoj de la plej diversaj nacioj.

La kultura valoro de Esperanto estis agnoskita ekde la Societo de Nacioj en 1922, ĝis ĉefe kulturaj internaciaj organizoj, kiel UNESCO (Montevideo 1954 kaj Sofio 1985), la Monda Turisma Organizaĵo, en Manila 1980, kaj lastatempe en la sino de la Eŭropa Konsilantaro en 1986.

Oni devas defendi la propran lingvon, ĉar ĉiam kunportas kulturon, sed sciante ke por la internacia komunikado ekzistas jam komuna lingvo per kiu oni neniam sentas sin diskriminaciita. Tiu lingvo estas ESPERANTO.

Tago kaj horo: Vendredon 21-an de Julio. 18,30 horo.

Loko: Vitoria-Gasteiz.

Preleganto: S-ro. Augusto Casquero de la Cruz; logopedisto; eksprezidanto de Madrida Esperanto-Liceo; elstara kaj ege aktiva hispan-movadano.

Temo: Esperanto: Estinteco, Estanteco kaj Estonteco.

Rimarkoj: Hispane.

I PREZENTADO.

I.1. NECESO DE IU INTERNACIA LINGVO.

I.1.1. Ekonomio, Turismo, Tradukaĵoj.

I.1.2. Difino de Homo.

I.1.3. Nombro da lingvoj. UNO, UNICEF kaj Europa Komunumo.

I.1.4. Kvar punktoj de Zamenhof.

I.2. DEVENO DE ESPERANTO.

I.2.1. Diversaj klopodoj krei internacian lingvon. Leibnitz; Pasigrafioj; surdmutuloj; numeroj; ĉina lingvo; volapük; swajili.

I.2.2. Esperanto, Zamenhof.

I.3. ESTANTECO DE ESPERANTO.

I.3.1. Plej patrineca helplingvon. Elspezema lingvo. Alilingva instrufiasko.

I.3.2. Ne utopia. Nombro da Esperantistoj. Grupoj. Revuoj, libroj, tradukaĵoj, turismaj broŝuroj. Organizaĵoj kiuj uzas Esperanton. Radio. Olimpikaj ludoj. Lernejoj.

I.3.3. Elstaruloj. Tolstoj, Unamuno, Alfonso XIII, Aŭstria Prezidanto.

I.3.4. Kongresoj.

I.4. GRAMATIKAĴOJ.

I.4.1. Hindu-eŭropaj radikoj. Natureco. Fonema. Logika.

I.4.2. Aglutinema. Prefiksoj "mal" kaj "in".

I.4.3. Dekses reguloj.

I.4.4. Verboj.

I.5. ESTONTECO DE ESPERANTO.

I.5.1. Pligrandiĝas la nombro da Esperantistoj.

I.5.2. Pligrandiĝas la nombro da publikaĵoj.

I.5.3. Oficialigo de Esperanto en la lernejoj de kelkaj landoj.

I.5.4. Dua parto de la hispana Ĝenerala Baza Instruado (E.G.B.).

I.5.5. F. Miterrand, Prezidanto de Francio.

II. RESUMO KAJ KONKLUDOJ.

II.1. La enkonduko de internacia lingvo estas tute ebla.

II.2. La enkonduko de internacia lingvo sukcesos, malgraŭ kontraŭstaroj de konservativuloj.

II.3. Nenia nacia lingvo estos internacia lingvo.

II.4. La plej taŭga internacia lingvo estas Esperanto, ĉu laŭ sia aktuala formo ĉu post kelkaj modifoj.

II.5. Ĉio-ĉi estos granda profito por la Homaro.

III. DEMANDOJ KAJ SUGESTOJ.

49-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Bilbao, 19/23 Julio 1989

PROGRAMO

MERKREDO 19-a:

- 9/11 h.: Disdonado de la Kongresdokumentaro.
- 10/12 h.: Oficiala malfermo de la Kongreso.
- 12,30 h.: Enaŭtobusiĝo por iri al la Urbodomo.
- 13 h.: Oficiala foto.
- 13,30 h.: Akcepto en la Urbodomo. Lunĉo.
- 14,30 h.: Tagmanĝo (dise kaj libervole, en la Malnova Kvartalo).
- 16,15 h.: Ĝenerala renkontiĝo en la «Nova Placo».
- (***) 16,30/18,30 h.: Kunveno de la HEF-estraro kun Grupaj delegitoj.
- (***) 16,30/17,30 h.: Oficialaj ekzamenoj de HEF-ILEI pri lingvo-scio kaj instrukapablo. (I)
- 16,30/18,45 h.: Senpaga gvidata piedirado tra la malnova parto de Bilbao («La Sep Stratoj»). (Nepra antaŭenskribiĝo).
- 17 h.: Arkeologia Muzeo.
- 18 h.: Teatro Arriaga.
- 19 h.: Kastillingva konferenco. (Urba Biblioteko, str. Bidebarrieta,4)
M^a R^a Uruëña: «*Esperanto: Kultura lingvo por la Homaro*».

Libro-Servo: Ne estas.

(*) Ekspozicio: 16/19 h.

ĴAŬDO 20-a:

- 9/10,30 h.: Samtempaj fakaj kunvenoj (H.A.L.E., I.L.E.I. kaj H.E.J.S.).
- 9/10 h.: Oficialaj ekzamenoj de HEF-ILEI pri lingvo-scio kaj instrukapablo. (II)
- 10/11 h.: Konkurso pri juna orator-arto; muziko, skeĉoj, ...
- 11/11,30 h.: Artaj, Kulturaj kaj Sciencaj Horoj. (Prelego de Sro. Simões pri «*Luziadoj*»)
- 11,30/12 h.: Parolado de la Prezidanto de la Kuba E-Asocio.
- 12/14 h.: Artaj, Kulturaj kaj Sciencaj Horoj. Luis Serrano Pérez prelegos pri «*Konfliktoj laboraj kaj ekonomiaj inter la homoj*». Kolokvo.
- 14 h.: Tagmanĝo (dise kaj libervole).
- 16 h.: 12-kilometra senpaga ekskurso per ŝipeto tra la rivero Nerviono ĝis Portugaleta kaj akcepto ĉe la tiea Urbodomo, fare de la Urbestro. (Nepra antaŭenskribiĝo).
- 18 h.: Reveno al Bilbao.
- (**) 21/24 h.: Projekcio de filmoj.

Libro-Servo: 10/13 h.


(*) Ekspozicio: 10/13 h. kaj 16/19 h.

Rimarkoj:

- ① Kongresejo, "Facultad de CC. Económicas" (SARRIKO).
- ② Restadejo "Miguel de Unamuno"
- ③ Stacidomo "Abando"
- ④ "Casco Viejo" (Malnova Kvartalo):
 - Grupo Esperantista.
 - Nova Placo.
 - Arkeologia Muzeo.
 - Urĝa Biblioteko.
 - Teatro Arriaga.
- ⑤ Urbodomo.
- ⑥ Ekspoziciejo.
- ⑦ Kablo-tramo al Artxanda.
- ⑧ Oficiala bankedo (str. Lersundi).
- [F] Trajnaj haltejoj.
(*"Ibarrekolanda"* apud-kongreseja haltejo).

49-a

H
I
S
P
A
N
E
S
P
E
R
A
N
T
O
N
G
R
E
S
O



VENDREDO 21-a:

9,30 h. : Senpaga bus-vojaĝo al Vitorio. (Nepra antaŭenskribiĝo).

11/11,15 h.: Presentado de la venonta Hispana Kongreso.

11,30/12,30 h.: Artaj, Kulturaj kaj Sciencaj Horoj.

A. Díaz prelegos pri «Gaudí».

13 h.: Oficiala akto. Akcepto far de la Urbestro.

14 h.: Tagmanĝo.

16/18 h.: Senpaga ekskurso tra Vitorio.

18,30/20 h.: Publika kastillingva konferenco en Vitorio.

A. Casquero: «*Esperanto. Pasado, presente y futuro*».

20,30 h.: Reveno al Bilbao kaj libera tempo.

Libro-Servo: Ne estas.

(*) Ekspozicio: 10/13 h. kaj 16/19 h.

SABATO 22-a:

9/11h.: Oficialaj ekzamenoj de HEF-ILEI pri lingvo-scio kaj instrukapablo. (III).

10/11,15 h.: Infana kurseto de Esperanto.

10/12 h.: Kolokvo pri «*Nuna situacio de la E-movado kaj perspektivoj*».

12,30/14 h.: Ĝenerala kunveno de H.E.F. (1-a parto).

14,30 h.: Tagmanĝo (dise kaj libervole).

15,30/18,15 h.: Ĝenerala kunveno de H.E.F. (2-a parto).

16 h.: Suprenirado al superurba monteto *Artxanda*. (Nepra antaŭenskribiĝo).

18,45 h.: Oficiala fermo de la Kongreso.

21 h.: Oficiala bankedo ĉe Bilbao-a restoracio.

Libro-servo: 10/14 h. kaj 16/18 h.

(*) Ekspozicio: 10/13 h.

DIMANĈO 23-a:

10 h.: Tuttaga senpaga ekskurso al Gemiko. (Nepra antaŭenskribiĝo).

14 h.: Kolektiva manĝo en Mundaka.

17 h.: Reveno al Bilbao.

18,30 h.: Adiaŭo en la Grupo Esperantista de Bilbao.

11/18 h.: Por tiuj, kiuj ne deziros iri Gernikon, estos ebleco kunveni en la Grupo Esperantista de Bilbao, ekde la 11-a ĝis la 18-a horoj, kie difinitaj grupoj, post peto al la Organiza Komitato, laboros pri temoj, kiuj estos antaŭanoncitaj de la L.K.K. dum la Kongreso mem. Je ilia dispono estos 3 malsamaj ĉambroj.

Libro-Servo: Ne estas.

Ekspozicio: Ne estas.

(*) En la domo kie troviĝas la "AISS" (Str. Gran Vía, 50).

(**) En la Grupo Esperantista (Barrencalle Barrena, 7, 1-a dekstre).

INFORMOJ DIVERSAJ

PARKI EN BILBAO. En multaj stratoj de Bilbao (la plej centraj), ne eblas libere parki aŭtomobilojn. Por tion fari, vi devas aĉeti, en tabakvendejoj, specialan paperaĵon, kiu kostas po 25, 50 aŭ 75 ptojn por $1/2$, 1 aŭ $1\frac{1}{2}$ hora parkado. Post $1\frac{1}{2}$ horo vi devas foriri el tiu zono al alia. La horaro dum kiu tiu regularo validas estas:

Labortagoj: 9/13,30 h. kaj 15,30/19,30 h..

Sabatoj, dimanĉoj kaj festotagoj: Ebleco parki libere.

Senpaga parkejo (ankaŭ sen tempo-limigo) : Kajo "Uribitarte".

EKSKURSOJ. Se vi deziras partopreni ilin, ne forgesu enskribiĝi la unuan tagon de la Kongreso. Ĉiuj estas senpagaj, kaj al jenaj lokoj:

Merkredo 19-a (16,30 h.): Piedirado tra la Malnova Kvartalo, kun vizitoj al Arkeologia Muzeo kaj Teatro Arriaga.

Jaŭdo 20-a (16 h.): Vojaĝo, per ŝipeto, de Bilbao ĝis Portugaleta, kie troviĝas la fama pendoponto.

Vendredo 21-a (9,30 h.): Tuttaga translokiĝo de la Kongreso al Vitoria.

